

# HEJIS

JUNULARA SEKCIO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO


REDAKTORO:  
S-RO. MIGUEL GUTIERREZ ADURIZ

N.º 99  
Mar.-Apr. 1976

Str. Barrencalle Barrena, 7 - 1.ª  
Telefono 424 44 92 - BILBAO-5



KIA ESTONTECO POR H. E. J. S.





# ENHAVO

La estraro informas	2-3
ĜVE eksterterge	3
Notoj	4-5
Pri la ludilo en Hispanio	6-7
Kontakto	8
32° 10' N	9
Mia avo venis en la urbon	10-11
Esperanto en la praktiko	12-13
Deziraro korespondi	14
Konkursaj krucvorttenigoj	15
Poezia truo	16



## LA ESTRARO INFORMAS



La 13-an de marto okazis en nia HEJS-sidejo de Bilbao, ordinara estrarkunsido, kaj pri ĝi la estraro volas informi la membraron pere de tiu ĉi artikolo.

Certe la traktitaj temoj havas malgrandan intereson ĉar temas precipe pri konfirmado de antaŭaj decidoj, tamen jen la tuto:

- a) La unua punkto de la tagordo estis: "II-a HEJS-tendaro en Santander", kaj pri ĝi la estraro decidis nepre okazigi ĝin kiel anoncote, malgraŭ la lastmomentaj malfacilaĵoj kaj la neĉeesto de la grupo de Sabadell. En ĉi tendaro la estraro havos eksterordinaran kunvenon en kiu kune kun la delegitoj ili klopodos prepari ian laborplanon por la sekcio, krome la kasisto prezentos la bilancon.
- b) La dua punkto estis: "Intersanĝantoj kaj senpagaj ricevantoj de HEJS-bulteno". Pri ĉi temo oni decidis, ratifiki la intersanĝon de nia revuo por la revuoj Kontakto kaj Horizonto, kaj sendi avertilon al la senpagaj ricevantoj por esplori la intereson kaj demandi ĉu ili volas plu ricevi, aŭ ne, nian publikajon.
- c) La tria punkto temis pri la "100-a numero de HEJS-bulteno". La kialo de la rea prezento de tiu ĉi punkto ene de HEJS-estrarkunsido estis la plialtigo de la kostoj de presitaĵoj; tamen malgraŭ la kosmaj ciferoj, la estraro decidis eldoni nian jubilean centan numeron prese.

d) Ene de la punkto: "pliaj sugestoj kaj proponoj", oni aprobis subvencii ĉiujn premiojn starigotajn en la marko de nia revuo. Ankaŭ la estraro decidis atentigi la HEJSanojn pri la neceso koni ilian naskiĝdaton por distingi inter membroj kaj simplaj abonantoj, kazo de ĝenerala voĉdonado (laŭ la 10-a regulo de nia regularo).

Nome de la tuta estraro subskribas, la nuna vicprezidantino, la konkludojn de la estrarkunsido:

Mercedes Castro

## TVE EKSTERLEĜE !

Jes , la hispana televido ade agas ekster la leĝaj ordonoj kia , tia de la 19-a de decembro de 1968, kiun promulgis la ministerio pri informado kaj turismo, kaj kiu determinas ke en ĉiu radia aŭ televida stacio, la leĝeraj kanzonoj devas esti kantataj je 70 procentoj (minimume) en iu ajn el la hispanaj lingvoj (galega, kataluna, kastilia aŭ eŭskera).

Ĉi denunco estis farita de la prezidanto de la nacia asocio de artistoj de cirko, varieteo kaj folkloro: Don Carlos Isafas Garzón.

Ateno estas la urbo kiu ĉijare gastigos la Universalan kongreson(UK)de esperanto, kiu okazos de la 31-a de julio ĝis la 7-a de aŭgusto.

La ĉeftemo de la UK estos: "Internacia kunlaboro de ŝtatoj je regiona nivelo".Krome estos diskutata apartan internan ĉeftemon:"Kiel nuntempe argumenti por esperanto".

La kongresa programo ja havos interalie aron da diversaj kunvenoj, prelegojn de Internacia Somera Universitato, kulturajn kaj amuzajn aranĝojn. Dum la semajno okazos duontagaj ekskursoj tra Ateno kaj al Kabo Sunion. Tuttaga ekskurso celos al Delfi aŭ Argolis kaj per ŝipo al la pli proksimaj insuloj.

Aliaĝon oni povas peti, al la landa peranto aŭ al UEA.

## SEMINARIO EN ZADAR

PRI

LINGVA IMPERIISMO

De la 23-a ĝis la 25-a de aprilo de 1976 okazos en la urbo Zadar, organizita komune de Kroatia Esperanta Junulara Asocio kaj Filozofia Fakultato de Zadar, internacia seminario

"Fenomenaj formoj de lingva kaj kultura imperiismo super la malpligrandaj lingvoj". La prelegoj estos dividitaj laŭ du grupoj; la unua: "Generala situacio en la mondo" kaj la dua sub la titolo "Lingvaj solvoj en plurlingva Jugoslavio kaj jugoslavaj minoritatoj.

### SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ

Ĉijare la flandra urbo Antwerpen, gastigos la 3-an sesion de Someraj Universitataj kursoj. La aranĝo okazos en la moderna universitata kvartalo inter la 8-a kaj 29-a de aŭgusto.

La studprogramo konsistas el universitatnivelaĵ kursoj pri BIOLOGIO, MATEMATIKO kaj SOCIOLOGIO. Oni organizos praktikajn ekzercojn, studvizitojn kaj seminariojn.

La kromprogramo enhavas inter aliaj, ekskursojn, vizitojn al la urbo, filmvesperojn, kulturajn aranĝojn, sportadon kaj aparte pagendan E-kurson perfektigan.

Interesitoj povas kontakti kun la jena adreso: SUK / B.P. 9 / B-4000 LIEGE / BELGIO.

### NIA KONKURSO

En la 15-a paĝo de ĉi revuo vi trovos krucvortenigmon, kies solvon vi povas sendi al ni por partopreni en la lotado de unu ekzemplero de la tre konata libro "AMUZAJ DIALOGOJ".

Limdato: ĝis la 15-a de majo de 1976.

II<sup>a</sup> Hejs-tendaro  
Santander 15-18 Aprilo

## pri la ludilo ←

⇒ en hispanio

Tial ke la ludilo estas aĵo preskaŭ esenca en la vivo de la infano, kaj la infaneco estas etapo kiu forte kondiĉas kelkajn flankojn de la posta homa vivo; ni, same kiel en la 97-a numero de nia revuo prezentis kelkajn ciferojn kaj faktojn pri la virino, nun deziras fari ion similan pri la ludilo. Do, jen nia eta laboraĵo:

- 0 En nia lando la ludiloj plej vendataj estas tiuj, kiuj havas movon, T.e. bicikloj, irantaj pupoj, ktp.
- 0 La nunaj ludiloj ne estas danĝeraj (?), sed tiuj, kiuj estas danĝeraj, estas la gepatroj kiuj ne scias elekti la adekvatan ludilon por la aĝo de siaj gefiloj.
- 0 La hispana ludilo havas internacian nivelon de kvalito. Precipe la pupoj estas eksportitaj al la tuta mondo.
- 0 Malgraŭ la granda sukceso de la didaktikaj kaj edukaj ludiloj, la hispana infano pasigas pli da tempo ludante en la strato ol hejme. Ĉu nia klimato iel kulpas? (?).
- 0 Kiam temas pri aĉeto de multekostaj ludiloj, la patro estas pli ama al aĉetado ol la patrino; kvankam poste li ne lasas al la infano ilin tuŝi pro timo ke li rompu ilin.
- 0 La pupoj kies modeloj estas popularaj uloj kiaj la pajacoj de la televido, la roza pantero, don cicuta, ktp., ne atingas sukceson ĉar mankas al ili vivo kaj la infano tion konscias.



- 0 La ludiloj el plasto , krom esti malmultekostaj, havas asekurita sian disvendadon la tutan jaron; dum la aĉetado de multekostaj ludiloj okazas kiam temas pri gravaj datoj, reyes, naskiĝtago, ktp.
- 0 Lastatempe la plastaj materialoj, kiuj devenas el la petrolo , plialtiĝis siaj kostoj , kio konsekvence plialtigis la kostojn de la plasta ludilo.
- 0 Fiskaj problemoj: Ĉiaspeca ludilo kies prezo superas 30 ptojn, estas konsiderata en hispanio ekde la jaro 1960 kiel luksa artiklo, kaj tial ĝi devas pagi impostojn. Konklude: ludi en hispanio estas lukso.
- 0 En neniu hispana fabriko de ludiloj ekzistas ajna buroo konsistanta el psikologoj.
- 0 Por la infanino ne multe gravas ĉu la pupo parolas, kantas, ploras aŭ kisas; sed tiu, kiun obsedas tiaj detaloj, estas la patrino.
- 0 En la merkato estas pli da ludiloj por la infano ol por la infanino. ĉu la kialo estas ke la infano rompas pli, do, aĉetas pli ?
- 0 La vendado de militaj ludiloj malpliĝis lastatempe.
- 0 La ludiloj el ligno kaj ŝtofo, tipaj el la orientaj landoj, revenas denove en la hispanan merkaton.

Ĉiuj ĉi informoj estas eltiritaj el diversaj revuoj kaj aliaspecaj fontoj.



El "Mafalda"

# KONTAKTO

Jen la bona novaĵo: Kontakto, la socikultura revuo de TEJO, baldaŭ reguligos sian aperadon.

Pri tiu ĉi esperanta perlo Ivo Lapenna iam skribis jene: "Tia Kontakto, kiu alfrontas aktualajn problemojn de la nuntempa junularo kaj, pli vaste, de la tuta homaro, estas ne nur utila, sed vere necesa. Ĝi (K) perfekte kompletigas la revuon Esperanto kiel la ĉefan organon de UEA kaj de la esperanto-movado generale".

Ankaŭ la muna HEJS-redaktoro, en artikolo aperinta en nia revuo kaj titolita "Ole Kontakto", prezentis la TEJO-revuon kiel: "neŭtralan forumon por libera intersaĝo de pensoj kaj kulturoj sur egala bazo, krisolon kie kunfandiĝas ĉiaj tendencoj kaj ideoj".

Certe Kontakto estas ĉio ĉi kaj eĉ pli.

Por aboni la revuon oni povas sin direkti al UEA aŭ al la hispana peranto: L.M. Hernández Yzal. / Villafranca del Panades / Av. Generalísimo n-ro 13 / apartado de correos 83 / Sant Pau d' Ordal / Barcelona.

Simpla abono kostas 13 gld jare, sed se vi deziras ricevi ĝin kune kun la revuo Esperanto kaj la jarlibro de UEA (por gejunuloj ĝis la aĝo de 21 jaroj) la tuto kostas 37.50 gld, (kaj ĝis 25 jaroj) 50 gld. Umuopa ekzemplero: 3 gld.

Kontaktemulo

legu "KONTAKTO"-n

kaj vi sentos vin

"KIEL KUKO EN BUTERO"

Tesaloniki

32<sup>a</sup> ijk

TEJO

La 32-a internacia junulara kongreso okazos ĉi-jare en Tesaloniki de la 24-a ĝis la 31-a de julio.

Tesaloniki estas la plej granda urbo de Greklando post la ĉefurbo Ateno. Ĝi estas la ĉefurbo de Makedonio "La Nimfo de Thermaikos" enhavanta 400.000 enloĝantojn. Pro ĝia situo, Tesaloniki ludis grandan rolon en la historio de Helenismo, funkciinta dum la pacaj periodoj kiel komerca centro kaj dum militaj periodoj kiel defenda centro.

Tesaloniki estis fondita en 315 a.k. de Kasandro, kiu fakte unuigis 26 malgrandajn najbarajn urbojn, honore al sia edzino nomita Tesaloniki.

La plej interesaj monumentoj estas: La blanka turo (emblemo de Tesaloniki kaj de la kongreso), diversaj preĝejoj, inter aliaj tiuj dediĉitaj al Sankta Sofio, Sankta Dimitrios, Panagia Añiropiitos kaj multaj aliaj, kun altvaloraj mozaikoj, kultura centro de Tesaloniki, la universitata urbo, la konstruaĵo de makedonaj studoj, la arkeologia muzeo, la apsido de galerios, la rotondo, kaj multaj aliaj.

Krom tio, ankaŭ oni povas diri ke Tesaloniki estas belega, relative nova urbo kun modernaj butikoj, teatroj, kafejoj, ktp.

Kiel kongresejo funkcios la studenta domo de Tesaloniki. Ĝi estas nova, moderna kaj komforta konstruaĵo, kiu havas multajn grandajn kaj malgrandajn salonojn por la kunvenoj, vastan restoracion kaj agrablajn kafejon, komfortajn ĉambrojn, ktp. La kongresejo situas en la centro de la urbo kaj tute facile oni povas viziti ion ajn el la multaj vidindaĵoj de la urbo. La temo de la kongreso estas: "Lingvo kaj Socio!" Sub tiu ĝenerala titolo funkcios diversaj studgrupoj kaj okazos prelegoj.

La programo konsistos inter aliaj eroj el: Interkona vespero, greka vespero, ekskurso, kongresa ballo, komitatkunsidoj de TEJO, estrarkunsidoj de TEJO, prelegoj, laborgrupoj.

Aliĝu, do, al la 32-a I.J.K. !!!

## mia avo venis en la urbon

Mia avo loĝis sola en la vilaĝo . Post familia interkonsento oni decidis , ke la avo loĝadu ĉe ni, en la urbo. Miaj gepatroj estis kontentaj; mi ankaŭ, sed, kiu estas mia avo? .Nu ,mia avo estas maljuna, preskaŭ okdekjara, sed spirite kaj fizike li estas forta. Lia karaktero estas agrabla, simpatia. Lia mensokapablo estas klera kaj li povas rezoni kiel iu ajn normala homo. Jen bildo pri mia avo.

Necese estas aldoni , ke neniam antaŭe mia avo estis en granda urbo. Dum la tuta vivo li loĝadis en la vilaĝo, kie li ja estis ege feliĉa , sed la nunaj cirkonstancoj ankaŭ trenis lin en la urbon. Li estas optimista homo pro kio lia translokiĝo ne ĝenis lin , male ofte eĉ li ŝercis pri sia nova vivo.

Hodiaŭ mi intencas rakonti al vi pri travivaĵoj okazintaj al mia avo dum la unuaj tagoj de lia restado en la urbo. Kompreneble, se mi priskribus la diversajn spertojn de mia avo dum lia nova vivo, ĉi tiu skribaĵo fariĝus tro longa.

Ĉu via avo estas malsana? , demandis al mi mia patrino, la sekvantan tagon de lia alveno ĉe ni. Vi rimarku, ke jam estas la 11-a horo kaj li ankoraŭ restas en la lito, aldonis mia patrino . Mi iris al la ĉambro destinita por mia avo , mi ŝaltis la lumon kaj konstatis, ke li ne estis dormanta. Kio okazas avo?, mi demandis. Nenio, li respondis, simple okazas, ke mi atendas la tagiĝon . Sed avo mia , jam estas la 11-a horo. Sed , kie estas la suno?, li demandis. Kara avo, en ĉi tiun ĉambron eniras neniam la suno , vi konstatu , ke fronte al via ĉambrofenestro troviĝas alta dombloko, kiu malebligas la eniron de l'sunradioj en la ĉambron. Mia avo multe komparis sian forlasitan sunplenan dormĉambro de la vilaĝo al tiu de la urbo. Vi jam povas supozi kion diris mia avo kaj tial ĝin priskribi fariĝas nenecesa.

Alian tagon mia avo decidis esplori la sociajn rilatojn de la homo en la urbo kaj li sin direktis al promenejo en kiu troviĝis multaj seĝoj por trankvile ripozi, sidadi. Vespere, reveninte hejmen, mi demandis al mia avo , ĉu vi amikiĝis al multaj personoj? . Ho!

nepo mia, li respondis, neniam en mia vivo mi estis tiel sola kiel hodiaŭ, malgraŭ tio, ke mi estis ĉirkaŭata de centoj da personoj, mi sentis min absolute izolita. Mi intencis konversacii kun kelkaj personoj, kiuj estis sidantaj apud mi, sed vane, al miaj demandoj ili nur respondis; "jes, ne, dankon, mi ne fumas, mi ne scias kaj per aliaj multaj similaj lakonaj respondoj". En la vilaĝo, diris mia avo, mi estis amiko de ĉiu homo, ekde la paŝtistoj ĝis la apotekisto, ne forgesante s-ron Karmelon, kiu ja estas la plej riĉa de la vilaĝo. Mi konsolis mian avon dirante, ke post kelkaj tagoj certe li trovos amikojn. Tamen mia avo ne konvinkiĝis, ĉar laŭ li, en lia vilaĝo ĵus alveninta homo tuj estas ĉies amiko kaj estas salutata de ĉiu vilaĝano. En tiu promenejo kie mi sidadis, ŝajnis ke ĉiu homo estas fremda. Ekzistis inter ili nenia rilato. Ĉu pravas mia avo?

Iun dimanĉon, matene, ni ambaŭ, tio estas mia avo kaj mi, decidis promeni kune tra la urbo. Mia avo, malgraŭ sia aĝo, ankoraŭ estas "verda". Li multe interesiĝas pri la virinoj kaj tiun tagon, dum promenado, nia konversacio temis pri virinoj. Mia avo diris al mi - Ludoviketo, nepo mia, kiom bonŝancaj estas vi la nunaj gejunuloj. Kiom ŝanĝiĝis la vivo kaj la kutimoj ekde mia juneco ĝis hodiaŭ. Tiuj belaj junulimoj kun tiuj minijupetoj estas mirindaj. Kiom libere vi povas interparoli. Mia avo intencis rakonti al mi pri fianĉino, kiun li havis kiam li estis juna, kaj ridetante li diris al mi; ŝi estis bela kaj inteligenta, ... sed kiom da vestaĵoj kaj subvestaĵoj ŝi kunportis, kaj senhonte li aldonis; kia laboro nepo mia, kia laboro. Hodiaŭ ĉio estas pli facila por vi. Avo, mi diris, ĉu vi ne hontas dirante tion? Ho!, nepo mia, la vivo forpasas rapide kaj vi devas ĝin profiti. Ne ploru morgaŭ pro tio, kion vi ne faris hodiaŭ. Se mi subite fariĝus dudekjara "alia koko kantus al mi". Mia avo tre admiras la nuntempajn rilatojn inter la gejunuloj.

Mi pensas, ke ĉi tiuj travivaĵoj de mia avo jam sufiĉas por komprenigi al vi la diferencon de la vilaĝa kaj urba vivo. Eble en alia okazo mi rakontos al vi pri aliaj spertoj de mia avo.

Luis Serrano Perez



## esperanto en la praktiko



Unue, permesu ke mi prezentu min. Mia nomo estas Johano, fraŭla junulo, nur 50-jara, tre entuziasma esperantisto, kompreneble absolute ne fanatikulo, loĝanta en malgranda vilaĝo. En mia dormoĉambro pendas la portreto de D-ro L. L. Zamenhof, apude staras granda esperanta flago, kaj la muroj kaj lito estas farbitaj verde. Mi havas hundon nomata "Esperanto" kaj kravaton kun 103 verdaj steletoj. Sur mia pijamo estas brodita bela silka stelo, ĉar tiel, se mi sonĝas pri esperantisto, tiu ĉi tuj konstatos ke ankaŭ mi parolas la saman lingvon.

La lernadon de esperanto mi komencis antaŭ dek kvin jaroj, kiel aŭtodidakto. Danke al la facileco de la Internacia Lingvo, nun mi jam kapablas diri "Bonan tagon! Kiel vi fartas? Ĝis revido!"

Tre bona esperantisto kaj tre agema mi estas; la tuta vilaĝanaro scias kio estas esperanto, danke al mia konstanta propagando en la kafejo, surstrate, unuvorte, ĉie. Eĉ oni nomas min "Johano, la esperantisto". Tio estas granda ĝojo por mi! Verdire, mi estas la unika samideano en mia vilaĝo kaj ĉirkaŭaĵoj.

Neniam mi partoprenis en Kongreso nek nacia nek internacia, sed tio estas tute ne grava. Ĉiuj esperantistoj de la mondo devus imiti min, ĉar mi aĉetas ĉiujare unu Esperantan libron! Jes, kaj precize je la "Zamenhofa Tago", la tago de la Esperanto-Libro. Mia biblioteko entenas specialan breton, kie staras nur esperantaj verkoj. Entute mi posedas 15 libroj! tiomkiom da jaroj mi estas en la Movado; kaj certe, fine mi havos 60 aŭ 70 pliajn, ĉar mi intencas vivi ĝis atingi almenaŭ cent jarojn (laŭ la nekrologoj aperintaj en la Esperanta gazetaro, la esperantistoj longe vivas).

La unua verko kiun mi aĉetis, post la lernolibro per kiu mi eklernis la Internacian Lingvon, est-

is la "Fundamento de Esperanto"; poste, "Retoriko", el tiu ĉi lasta, mi multon lernis pri la arto paroli esperantlingve al la publiko, kvankam, ĝis nun, mi ankoraŭ ne havis okazon fari tion.

La libron aĉetitan en la Libro-Tago, mi legas, relegas kaj trafoliumas dum unu tuta jaro; nokte kaj tage ĝi akompanas min; ĝi kuŝas sur la tablotuko, apud la telero, kiam mi manĝas (kelkfoje falas sur la legatan paĝon olea gutego aŭ supo aŭ saŭco, sed ne gravas, male, la makuloj ornamas la libron, ili estas kiel ordenaj honoraj medaloj).

La lasta libro akirita, pasintan decembron, estas la plej utila libro de Esperantujo: la PIV, t. e., la Plena Ilustrita Vortaro. Ĝi estas belega amaso da vortoj. Ĉiunokte, post vespermanĝo, en la lito, mi encerbumigas la 3.297 (eble mi miskalkulis) neologismojn, kiujn entenas PIVo, kies kvanto estas la 21,98 procentoj de la vorttrezoro. Kiam mi scios parkere ĉiujn neologismojn, tiam mi fariĝos la plej granda erudiciulo el la tuta historio de la Esperanto-Movado.

Mi estas konvinkita ke la Esperanta Literaturo estas tre utila. Tion mi demonstros al vi sekve: antaŭ unu semajno, pro labora demarŝo, mi vojaĝis al la granda urbo. Dum la veturado mi legis PIVon. Post elvagoniĝo je la sesa horo matene, kiam la suno ankoraŭ ne estas videbla ĉe la ĉielo kaj strate regas la malhelo, proksime de la stacidomo mi estis surprizita de rabisto, kiu portis ĉemane poŝan tranĉilegon per kio li minacis min. En tiu momento mi rememoris frazon, kiun mi legis iam en libro: "UZU ESPERANTON EN LA PRAKTIKO!" Jen, mi pensis, nun estas bona okazo por uzi esperantan literaturon, kaj prenante per mia dekstra mano mian dikan PIVon, kiun mi tenis subla maldekstra akselo apogita sur la antaŭbrako, mi forte frapis per ĝi la kapon de la ŝtelisto, kiu falis senkonscie teren, kaj post kelkaj minutoj policisto arestis lin.

Tio pruvas ke la Esperanta Literaturo estas tre utila.

PETRO NUEZ

## DEZIRAS KORESPONDI:

Tri 18-jaraj lernantinoj kaj unu 25-jara labo-  
risto el Sovetunio deziras korespondi kun hispan(in)oj

Lukjanova Iatjana  
stz Žveju 1-4  
Klaipėda USSR 235800

Kačanova Anna  
stz Peršales 1-4  
Klaipėda USSR 235800

Černjnk Ludmila  
stz Mažoji 2-4  
Klaipėda USSR 235800

Finkovskij Eŭgenij  
stz Kalvos 7-12  
Klaipėda USSR 235801

Ili ĉiuj lernas esperanto-n kaj interesigas ĉe-  
fe pri sporto, turismo, muziko kaj teatro.

21-jara studento, kiu interesigas ĉefe pri la  
romkatolika religio, fremdaj lingvoj, vojaĝoj; li kolektas  
turistprospektojn kaj fotografaĵjn.

Henryk Anzulewicz  
str. Stawińskiego 8- D.A.  
20-080 Lublin (pollando)

16-jara lernanto, kiu interesigas pri literatu-  
ro kaj sporto.

Jarosław Słoma  
str. Kościuszki 3  
19-500 GOTDAP (pollando)


16-jara lernanto de gimnazio interesigas pri  
mekaniko kaj sporto.

Artur Ratasiewicz  
plac. Zwyciestwa  
19500 GOTDAP (pollando)

16-jara lernantino, interesigas pri muziko ge-  
ografio kaj ankaŭ kolektas poŝtmarkojn.

Surel Małgorzata  
str. Jagrellońska 20/2  
15-250 BIAŁYSTOK (pollando)





## Krucvort - - enigmo

Horizontale.- 1)Konsonanto. Vokalo. Vokalo. 2)Punkto de kiu io evoluis kaj disvolviĝis. 3)Vokalo. Vokalo. konsonanto. 4)Numeralo . Nomo de infuzaĵo. 5)- Tri konsonantoj. 6)Postulanta oksigenhavan aeron por vivi. 7)Vo-

kalo. Konsonanto. Vokalo.

Vertikale:- 1)Tri vokaloj. 2)Kavaĵo en la tero, fosita por enmeti la fundamenton de muro, planti arbon, meti fervojon aŭ strato, ktp. 3)Vokalo. Vokalo. Konsonanto. 4)Ekstera montro de ies forto aŭ kapablo. Interjekcio signifanta energian forpelon aŭ rifuzon. 5)Vokalo. Konsonanto. Konsonanto. 6)- Spiritlerta, sagace kaj fekunde eltrovema. 7)Vokalo. Vokalo. Vokalo.



## poezia

Kie ne plu  
nestas ĝu',  
kovas enu'  
angore.

Al ĉiu sens'  
disde mens',  
elgutas pens'  
dolore.

liven

## truo

Nula nul'  
en angul',  
revas ul'  
senlimon.  
estas mort'  
homa sort',  
premas fort'  
animon.

liven

Mi - papilio  
aŭ homo. Vekiĝo ja  
ne solvas tion.  
Mi estas homo  
aŭ papilio. Solvos  
ja tion morto.

*Atjkus Bukiŝ*

Solas  
kiel akvoguto  
meze de l' maro  
mi

*Atjkus Bukiŝ*

Jen kvar etaj pecoj de du junaj hispanaj  
poeziemuloj; Atjkus Bukiŝ kaj Liven.